


SVISA ESPERANTO - SOCIETO

INFORMAS

N-ro 3/1994

MAJO-JUNIO



13-a INTERNACIA LITERATURA FORUMO
BRATISLAVO/SLOVAKIO
2-6 JULIO 1994

ORGANIZANTOJ: Kooperativo de Literatura
Foiro kaj Bratislava Esperantoklubo
La Forumo estos dediĉita al la temo:

LA ESPERANTO-KABARETO

Krom prelegoj pri la anoncita temo,
okazos artaj prezentoj kaj ekskursoj.

Honorigu nin per via aliĝo!

Agrablan restadon en Bratislavo

Detalan informon kaj aliĝilon vi ricevos
ĉe la redakcio de SES INFORMAS. Bonvolu
aldoni al vi afrankitan koverton. Dankon.

-FL-

MESAĜO DE LA NOVA PREZIDANTO

Karaj SES-anoj,

Laŭ decido de la Asembleo mi transprenis por tri jaroj oficon, kiu tre honoras kaj ĝojigas min, sed kies malfacilon mi plene konscias.

Tial, salutante unuafoje novajn kaj jam konatajn geamikojn en mia ĵusa vesto, mi deziras pli amplekse prezenti la gvidliniojn de mia simpla programo, jam skizita dum la Asembleo.

Unuavice kaj plej atente mi zorgos ke daŭru, laŭ la jam elektitaj komisiitoj kaj kontraktoj, la ĝisnunaj servoj al la membraro: SES INFORMAS, LITERATURA FOIRO, regionaj kunvenoj ktp. Serioza asocio ja devas garantii bonajn servojn al la personoj, kiuj ĝin fidas.

Por plenumi la prioritatan celon de nia statuto (disvastigi en Svislando la lingvon Esperanton) necesas formadi niajn aktivulojn en la kampoj de informado, publikaj rilatoj, lingvo-surmerkato. Por tion atingi ni devas organizi almenaŭ unu staĝon sub la gvidado de esperantistaj fakuloj. La kosto de tiu(j) staĝo(j) apartenas al la rubriko "propagando, varbado". La staĝoj celas kaj nunajn kaj novajn aktivulojn. Estus ideale se partoprenus po unu aktivulo el ĉiu loka, kantona aŭ faka societo.

Ankaŭ cele al la respondecigo de ĉi tiuj aktivuloj, sed ĝenerale por pli bone konatiĝi kun la svisaj cirkonstancoj, la unuan jaron de mia mandato mi speciale dediĉos al renkontoj kun kiel eble plej multaj lokaj realaĵoj, societoj kaj individuoj.

Rilate al la transnaciaj realaĵoj, kiuj ekzistas en la svisa Esperantio (KCE, CDELI, LF-koop ktp) mi intencas flegi kiel eble plej harmoniajn rilatojn, en reciproka plena respekto de la propra aŭtonomio, por valorigi ĉiujn kompetentojn favore al la florado de nia idealo kaj statuta celo.

Pri la rilatoj kun UEA, mi konsultiĝos tuj kiam eble kun la ĉefdelegito, la komitatanoj de UEA kaj de TEJO, la reprezentanto de IFEF.

Multego estas farenda, kaj por tion certigi mi kalkulas pri miaj bonaj kunlaborantoj, la membroj de la Estraro kaj de la Centra Komitato, sed ankaŭ pri la lojala helpemo de ĉiu unuopa SES-ano, kiun jam anticipe mi plej kore dankas. Mi scias, ke en la daŭro de tri jaroj mirakloj ne eblas – verŝajne, eĉ ne dum pli longa periodo – sed certe ni povos atingi ion pozitivan, se ni laboros en harmonia etoso, kie ĉiuj pretu oferi iom por la rajto kaj fiero aparteni al komunumo kelkflanke supera al aliaj nacioj. Kiel estis dirite en fama prelego, kaj bedaŭrinde refariĝis hodiaŭ plene aktuala, ni konsciu ke nia flago estas *la sola ne makulita de homa sango*, kvankam ankaŭ ni, esperantistoj, devas priplori niajn viktimojn.

Svislando, lando de libero, frue komprenis la idealojn de esperanto kaj ĝin brile subtenis per sia pozitiva realismo: ĉiuj kune ni klopodu, modeste sed firme, daŭrigi la belan tradicion.

Perla Martinelli

oo0oo

ATENTU PRI LA SUBA INFORMO:

Mi estis petita meti la novan, flavan Esperanto-varbilon en la mezo de tiu-ĉi SES INFORMAS, por ke ĉiu povu facile elpreni ĝin. Tial tiuj kvar paĝoj ne estas numeritaj. -Red-

oo0oo

PROTOKOLO

Ĝenerala Kunveno 1994

36 personoj partoprenis la ĝeneralan kunvenon de SES la 12-an de marto 1994, en la stacidoma bufedo de Olten. Senkulpiĝis Tazio Carlevaro, Marion kaj Mireille Grosjean, Nicole Margot kaj Christiane Sixtus-Pot.

Malfermo

Prezidanto: Claude Gacond (La Chaux-de-Fonds), SES-prezidanto. Asisto: Andy E. Künzli (La Chaux-de-Fonds), sekretario, protokolanto; Fritz Liechi (Zürich), vicprezidanto; Ernst von May (Oberuzwil), kasisto.

Tagprezidas Claude Gacond kaj Perla Martinelli (Chiasso), CK-anino.

TAGORDO

a) Protokolo de la antaŭa ĝenerala kunveno 1993 (aperinta en 'SES informas' 3/1993).

Per 31 voĉoj unuanime akceptita.

b) Raporto de la Centra Komitato (aperinta en 'SES informas' 2/1994).

Franz Brügger kritikis, ke mankas mencio pri la 'Tago X'. Claude Gacond responde memorigas, ke Franz Brügger kaj Lucerna Esperanto-Societo okaze de la pasinta kunsido de la Centra Komitato la 12-an de februaro 1994 en Luzern estis delegitaj okupiĝi pri tiu demando kaj ke SES promesis financan helpon de fr 400.-, se la projekto konkretiĝos. Didi Weidmann certigas, ke Zurika Esperanto-Societo alportos sian apogon. La raporto aprobiĝas ĉe 2 kontraŭaj voĉoj.

c) Financa raporto.

Didi **Weidmann** konkludas el la ŝparita sumo ĉe la rubriko 'informado', ke la societo ne plenumis sian laboron. Claude **Gacond**, kiel li menciis en sia raporto, estis labore superŝutita. Tial li ne sukcesis akurate plenumi ĉiujn devojn. Samtempe li ne akceptas, se oni ĉiam nur postulas kaj mem ne kunlaboras kaj poste plendas. Neniu sin anoncis por pretigi propagandilojn kaj organizi varbkampanjojn. Ne ĉion povas fari la estraro. Claude **Gacond** intencas propagandi antaŭ gimnazioj, kiam li estos emerito, do iom libera dum la lerneperiodoj. Giorgio **Silfer** procedure rimarkas, ke eblus voĉdoni pri la financa raporto nur aŭskultinte la raporton de la kaskontrolantoj. La financa raporto akceptiĝas ĉe 1 kontraŭa voĉo.

ĉ) Raporto de la kaskontrolantoj.

Kaskontrolanto Ernst **Glättli** (atestata de Margrit **Guldin**) laŭtlegas la modele faritan raporton. Li deziras, ke la malfruo de la rekotiza alvoko ne plu okazu. Laŭ Didi **Weidmann** readmoni nekotizintojn estas la tasko de la kasisto. Giorgio **Silfer** gratulas, ke ĉe administraj kostoj oni ŝparis. Angelo **Mellini** postulas de la kaskontrolantoj klaran riproĉon al la adreso de SES koncerne la neplenumon de la lastjare buĝetita varbagado. Laŭ Giorgio **Silfer** riproĉi ne estas la tasko de la kaskontrolantoj. La raporto aprobiĝas unuanime.

d) Raporto de la komisionoj.

Ne okazis aktiveco ĉirilate.

e) Elektoj.

Claude **Gacond** ririgardas al la pasinteco, klarigante, ke la celo de lia siatempa prezidanta kandidatiĝo estis plidinanikigi la asocion. Grandparte li sukcesis, starigante firman strukturon de estraro kaj centra komitato, regule reokazigante la regionajn semajnfinojn kaj solvante la gazetan problemon. Li eĉ iniciatis organizi nacian kongreson, kiu okazis pasintjare. Nun emeritiĝante li ŝatus transdoni la torĉon. Tamen, li pretas kandidatiĝi kiel vicprezidanto. En lastatempaj diskutoj kun Perla **Martinelli**

evidentiĝis, ke ŝi pretus kaj maturus gvidi la asocion. Post sinprezento Perla **Martinelli**, italino vivanta en Svislando ekde 1978, kiu spertas pri la realaĵoj de la svisa Esperantio, promesas trijaran engaĝon. La du kandidatoj forlasas la salonon, en kiu lanĉiĝas vigla diskuto pri avantaĝoj kaj malavantaĝoj de prezidanta ŝanĝiĝo. Post konfidenca ekzameno de ĉiuj esencaj demandoj, la asembleo elektas (ĉe 1 sindeteno) Perla **Martinelli** nova prezidanto de SES kaj Claude **Gacond** unuanime vicprezidanto. Al la antaŭa vicprezidanto kaj redaktoro de 'SES informas' Fritz **Liechti** la asembleo esprimas sian respekton kaj dankon pro la plenumita laborego. Oni emfazas, ke kun Perla **Martinelli** SES post pluraj jardekoj denove havas inan prezidanton. La novaj prezidantino kaj vicprezidanto intencas interalie delegi plurajn taskojn. En la ĉeesto de la novaj prezidanto kaj vicprezidanto reelektiĝas du aliaj CK-anoj: Andy E. **Künzli** kiel sekretario (laŭ lia deziro nur por unu jaro) kaj Ernst von **May** kiel kasisto. Ankaŭ ambaŭ gekaskontrolantoj Ernst **Glättli** kaj Margrit **Guldin** reelektiĝas. Post laŭtleĝo de lia longa biografio fare de Ernst **Glättli**, nova honora membro fariĝas Hans **Bipp** (Birsfelden), kiu antaŭ nelonge 80-jariĝis. Pro tio ke Hans **Bipp** ne ĉeestas, Ernst **Glättli** persone transdonos la diplomon al la honorito.

f) Buĝeto.

Didi **Weidmann** deziras, ke, sub 'varbado', estu precizigitaj en la buĝeto fr 400.- favore al la 'Tago X'. Oni aprobas tion ĉe 2 sindetenoj. La buĝeto unuanime akceptiĝas.

g) Proponoj.

El la membraro ne venis proponoj ĝis la fiksita limdato. La CK de SES proponas al la asembleo fariĝi publike pli aktiva kaj altiri la atenton pere de rezolucioj, kiuj fontas en la responso de la esperantistoj pri homaj rajtoj. Perla **Martinelli** prezentas la rezoluciproponon, laŭ kiu observiĝas militkrimoj en Bosnio-Hercegovino kaj kadre de tio pluraj senkulpaj viktimoj el la esperanto-komunumo; kiu bedaŭras, ke pro sia nealiĝo al UN Svislando ne povas ludi rolon pli aktivan por la paco kaj invitas la svisajn aŭtoritatojn ne akcepti sur la svisa teritorio politikistojn el

eksa Jugoslavio, se ilia aktiveco pruviĝis favori tieajn militkrimojn. Laŭ Didi **Weidmann**, kiu prezentiĝas kontraŭulo de UN, la aludo al UN estas kontraŭstatuta. Franz **Brügger** dubas, ĉu la SES-statuto permesas aprobi rezoluciojn kun politikema karaktero. Perla **Martinelli** opinias ke jes, pro la homrajta paraĝrafo. Angelo **Mellini** rifuzas tiajn rezoluciojn kaj postulas precipe de la sekretario, iniciatinto de tiaj rezolucioj, plenumi sian poresperantan laboron. **Parzival** (ne membro) proponas siajn pacservojn kaj sian kanalon por transdoni rezoluciojn al UN. Lucienne **Dovat** petas sekrete voĉdoni ĉu entute malfermi (aŭ ne) la diskuton pri rezolucioj kun politika enhavo. Se la respondo de la asembleo estas jesa, oni voĉdonos pri la proponita teksto. Rezulto: 12 voĉoj poras kaj 12 kontraŭas, ĉe 3 malplenaj slipoj. La prezidanto deklaras la respondon nea, ĉar la jesoj ne atingis la plimulton. Giorgio **Silfer** rimarkigas, ke la rezoluciproponoj devus esti anticipe publikigitaj en la organo, aŭ menciitaj en la dissendita kunvoko, por ke la membroj povu pripensi la demandon.

ĝ) Diversaĵoj.

Sub tiu punkto oni memoras la forpasintajn membrojn Dora **Hemmann** (Bern), Tina **Peter-Rüetchi** (Zürich), Hermann **Schmutz** (Basel) kaj Jakob **Hohl** (Flims). Krom tio, oni gratulas al Edouard **Waldvogel** (Neuchâtel), kiu antaŭ ne longe iĝis 100-jara.

Noto: Tiu ĉi protokolo, verkita de la sekretario Andy E. **Künzli**, reviziita de la tagprezidantoj Claude **Gacond** kaj Perla **Martinelli**, estis aprobita de la estraro de SES dum kunsido okazinta en Zürich la 11-an de aprilo 1994. Tiam Andy E. **Künzli** komunikis al la estraro, ke lia demisio havas tujan ekvalidon. La estraro akceptis tiun decidon.

GRUPAJ INFORMOJ

ESPERANTO-SOCIETO BASEL:

En restoracio Riehentorhalle.

26.5.20.00h Monata kunveno: La prezidantino
prelegos pri: "La Ĵuraso"

23.6.20.00h Monata kunveno: S-ro Andy Künz-
li prelegos pri:
"ESPERANTO en Svislando"

29.6. Tuttaga trilandaj ekskurso kun
pikniko.

Informojn volonte donas la pre-
zidantino, S-ino N. Béroud.

BELLINOZA:

14.5.17.00h kaj 11.6.17.00h ĉiam sabate
en viale Motta 32.

ESPERANTO-SOCIETO BERN:

En restoracio AL FORNO, Spitalgasse 37.

3.5.19.30h kaj 7.6.19.30h.

ESPERANTORONDO BIELO:

Ĉiun vendredon en restoracio AMI, Freie-
strasse 8, 18.00h-19.00h.

ESPERANTO-SOCIETO LAUSANNE:

2.5.20.30h Monata kunveno: S-ro Eichkorn
prelegos pri:
LA Sovaĝaj plantoj.

5.6. Ekskurso Grillon-Les Plans-sur-
Bex.

LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO:

11.5.14.00-16.00h Paroliga kunveno en Big
Ben. Guido Franz Brügger.

26.5. Promenado laŭlonge de la lago
de Lucerno. Renkontiĝo 19.00 ĉe
la Wagenbach-Fontano. (je ĉiu
vetero).

8.6.14.00-16.00h Paroliga kunveno en Big
Ben. Guido Franz Brügger.

23.6.20.00h Amuziga vespero: Ludi, muziki,
kanti kaj solvi enigmojn. Guido:
Paul Scherer kaj Franz Brügger.

Esperanto - die Andere Sprache




ESPERANTO: WELTSPRACHE PAR EXCELLENCE

Esperanto ist keine Ethnosprache (Nationalsprache), sondern eine **internationale Plansprache**. Esperanto unterscheidet sich also grundlegend von anderen Sprachen, denn es wurde von vornherein bewusst als eine internationale **Welthilfssprache** geschaffen. Das Hauptziel des Esperanto ist, **neben den Nationalsprachen als neutrale Zweitsprache** die Verständigung unter Völkern und Religionen zu erleichtern. Die Befürworter des Esperanto meinen, dass nur eine Plansprache wirklich instande ist, die Rolle einer wahren Weltsprache zu übernehmen. Esperanto ist also die Sprache einer **modern denkenden internationalen (übernationalen) Gesellschaft**, die mit Erfolg versucht, die Enge des nationalen Denkens zu überwinden. Humanismus, Pazifismus und Menschenrechte heissen die Ideale L.L. Zamenhofs, des Erfinders des Esperanto.

ESPERANTO: EINE HUNDERTJÄHRIGE TRADITION

Unterdessen sind **über 100 Jahre Esperanto-Geschichte** verstrichen. Esperanto-Benützer und -Organisationen gibt es in **über 100 Ländern**, so auch in der Schweiz. Die **Schweizer Esperanto-Gesellschaft**, die **Schweizer Esperanto-Jugendgruppe**, das **Esperanto-Kulturzentrum** in La Chaux-de-Fonds sowie einige **Lokalvereine** (Zürich, Basel, Genf, Luzern, u.a.) sorgen für die Verbreitung und die Pflege des Esperanto in diesem Land. Neben dem Esperanto-Kulturzentrum befindet sich in der Neuenburger Uhrenmetropole auch das **'Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale'**, ein einmaliges wissenschaftliches Archiv, das alles sammelt, was über Plansprachen und in Esperanto erscheint. Die **UNESCO** hat in zwei Resolutionen die **völkerverbindende Rolle** des Esperanto gewürdigt und den einzelnen Staaten empfohlen, Esperanto zu fördern.




La lingvo sin prezentas! Die Sprache stellt sich vor! La langue se présente! La lingua si presenta!

La ekzemplo de la pomo bone montras la universalecon de Esperanto.
Am Apfelbeispiel lässt sich sehr schön zeigen, wie vielseitig Esperanto ist.
L'exemple de la pomme montre bien l'universalité de l'espéranto.
L'esempio della mela mostra bene l'universalità dell'Esperanto.

Deutsch	Esperanto	français	italiano
Zeit	tempo	← temps	tempo
Sekunde	↳ sekundo	← seconde	secondo
Minute	↳ minuto	← minute	minuto
Stunde	↳ horo	← heure	ora
Tag	↳ tago	← jour	giorno
Woche	↳ semajno	← semaine	settimana
Monat	↳ monato	← mois	mese
Jahreszeit	↳ sezono	← saison	stagione
Frühling	↳ printempo	← printemps	primavera
Sommer	↳ somero	← été	estate
Herbst	↳ aŭtuno	← automne	autunno
Winter	↳ vintro	← hiver	inverno
Jahr	↳ jaro	← année	anno

Deutsch	Esperanto	français	italiano
warm	↳ varma (varm/a)	chaud	caldo
kalt	malvarma (mal/varm/a)	froid	freddo
lauwarm	varmeta (varm/et/a)	tiède	tiepido
Wärme	varmeco (varm/ec/o)	chaleur	calore
Kälte	malvarmeco (mal/varm/ec/o)	froidure	freddezza
wärmen	varmigi (varm/ig/i)	chauffer	riscaldare
kühlen	malvarmigi (mal/varm/ig/i)	refroidir	raffreddare

La vortaro (ŝelo) estas hindo-eŭropa, precipe latin-germana.
Der Wortschatz (die Schale) ist hindo-europäisch, genauer latino-germanisch.
Le vocabulaire (la pelure) est indo-européen, avant tout latino-germanique.
Il vocabolario (la buccia) è indoeuropeo, prevalentemente latino-germanico.



La afiksosistemo (pulpo) estas aglutina, kiel en la hungara, finna, turka.
Das Vor- und Nachsilbensystem (das Fruchtfleisch) ist agglutinierend, wie im Ungarischen, Finnischen und Türkischen.
Le système d'uffixes (la pulpe) est agglutinant, comme en hongrois, en finnois, en turc.
Il sistema di affissi (la polpa) è agglutinante, come nell' ungherese, nel finnico, nel turco.

La ebleco uzi afikson kiel memstaran radikon (kerno) estas izoliva, kiel en la ĉina kaj vjetnama.

Die Möglichkeit, Vor- und Nachsilben als selbständigen Wortstamm zu verwenden (der Kern), ist isolierend wie im Chinesischen und Vietnamesischen.

La possibilité d'utiliser un affixe comme s'il s'agissait d'une racine autonome (le pépin) est isolant, comme en chinois et en vietnamien.

La possibilità di usare gli affissi come radici a sé stanti (il torsolo) è isolante, come nel cinese e nel vietnamita.

Deutsch	Esperanto	français	italiano
Lastwagen	kamiono	← camion	camion
Lieferwagen	kamioneto (kamion/et/o)	camionnette	camioncino
kleiner Lastwagen	eta kamiono	un petit camion	un piccolo camion
Kleinheit	eteco (et/ec/o)	petitesse	piccolezza
verkleinern	etigi (et/ig/i)	rapetisser	rimpicciolire
kleiner Mann	etulo (et/ul/o)	un petit homme	un ometto
kleine Frau	etulina (et/ul/in/o)	une petite femme	una donnina




**ESPERANTO:
FÜR FREUNDSCHAFT, SOLIDARITÄT UND
TOLERANZ**

**ALTERNATIV UND VORTEILHAFT REISEN:
MIT ESPERANTO**

Esperanto ist eine **Sprache der Praxis**. Auch im internationalen Tourismus nimmt Esperanto an Bedeutung zu. Jedes Jahr finden unzählige **Kongresse, Treffen, Seminare und Kurse in vielen Ländern** statt, wo sich die Esperantisten versammeln, ihre Erfahrungen austauschen, miteinander einfach über alles reden und sich weiterbilden lassen. Solche **Weltkongresse**, die jährlich einige Tausend Menschen verschiedenster Zunge vereinen, fanden in jüngster Vergangenheit in Kuba (1990), Norwegen (1991), Österreich (1992) und Spanien (1993) statt. Der 79. Weltkongress, organisiert vom Esperanto-Weltbund und seinen koreanischen Mitarbeitern, wird 1994 in Seoul über die Bühne gehen. Die internationale, Esperanto sprechende Jugend traf sich in letzter Zeit in Schweden, Kanada, Bulgarien, Deutschland, Italien und Ungarn.

Wo internationale Kontakte oft leider oberflächlich bleiben, **bietet Esperanto mehr**. Wo Esperanto Fuss fasst, da entsteht ein **neuer Geist**, da macht sich ein grosses **Interesse für fremde Kulturen** breit. Esperanto fördert das **vorurteilsfreie und neutrale, interkulturelle Denken** und weckt **Sympathie, Solidarität und Toleranz** für Menschen aus anderen, oft minoritären Kulturkreisen. Esperanto trägt in sich den Geist des **brüderlichen Umgangs mit Menschen**, der frei ist von nationalem Chauvinismus, frei von parteipolitischer Überheblichkeit, frei von argwöhnischer Staatsbürokratie, frei von religiöser Dogmatik. Der alte Traum liberaler Demokraten! Esperanto praktisch anwenden und mit Esperanto reisen heisst: Einheimische treffen, mit ihnen zusammen wohnen, in ihren eigenen vier Wänden diskutieren, also **fremde Lebens- und Denkweisen direkt und unmittelbar, ohne Dolmetscher kennenlernen**. Die Esperantisten, viele unter ihnen fühlen sich als echte, freie **Weltbürger**, sind überall ein bisschen zuhause. Das praktische und interessante Reisevergnügen erleichtert **Pasporta Servo**, ein weltweites Netz mit Adressen von Gastgeber, wo man **kostenlos übernachten** kann. Die gastfreundlichen Esperantisten warten schon...




**ESPERANTO:
BESEITIGT EINE UNGERECHTIGKEIT**

Eine neutrale Weltsprache beseitigt eine grosse Ungerechtigkeit. Denn wer beispielsweise in der UNO oder in der Europäischen Union in seiner Muttersprache sprechen darf, hat bedeutende Vorteile. Wer hingegen gezwungen ist, in einer Fremdsprache zu debattieren, ist arg benachteiligt. In der Zeit des **Neonationalismus** bestehen aber manche Mitgliedstaaten eben auf der Verbreitung ihrer eigenen Sprachen. Eine Besserung dieser verfahrenen Situation ist nicht in Sicht.

ESPERANTO: FÜR ALLE !

Fast alle gesellschaftlichen Interessengruppen wie Forscher, Sammler, Geschäftsleute, Blinde, Lehrer, Gläubige, Philatelisten, Journalisten, Musiker, Pöster, Pfadfinder, Vegetarier und andere lernen die Dienste schätzen, die Esperanto zu leisten imstande ist. Jedes Jahr veranstalten die Fachleute auch ihre eigenen Treffen. Jede/r hat also die Möglichkeit, mit Gleichgesinnten - in Esperanto heisst dies 'samideano' - auf der ganzen Welt in Kontakt zu treten.



Abtrennen und einsenden an: Esperanto-Kulturzentrum, Postiers 27, Postfach 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds. Tel. 039/26 74 07. Fax: 039/26 62 03.

Mit diesem Abschnitt können Sie eine **Gratisdokumentation** über Esperanto anfordern, die im übrigen auch die **1. Lektion** des **Gratisfernurses** für Deutschsprachige enthält (gültig nur in der Schweiz). Dieser Bon verpflichtet Sie weder zum Kauf von Esperanto-Produkten, noch zum Eintritt in eine Esperanto-Organisation.

Ja, ich möchte diese Dokumentation erhalten.

Herr Frau

Name: _____

Vorname: _____

Vollständige Adresse: _____

ESPERANTO-SOCIETO NEUCHÂTEL:

Ĉiumonate iun vendredon, laŭ ebleco de la membroj.

ESPERANTO-STUDGRUPO VEVEY:

9.5.16.30-18.30h kaj 9.6.16.30-18.30h monataj kunvenoj ĉe Jeanne Mamin, 19, Communaux. Gvido: Lucienne Dovat.

ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:

- 9.5.19.00h Monata kunveno en Karl der Grosse. La prezidanto respondas al:
LINGVAJ DEMANDOJ. Bonvolu sendi viajn demandojn anticipe al li.
- 30.5.19.00h Libera kunveno ĉe familio Weidmann, Eisengasse 22, Tramo 2 aŭ 4 ekde Bellevue, ĝis haltejo Kreuzstrasse.
- 11.6.10.30 ĝis 16.00h stando en la Bahnhofstrasse, sur la "Pestalozzi-Wiese". Je ĉi tiu vetero informas telefono 156 54 34. Alternativa dato 18.6.
- 13.6.19.00h Monata kunveno en Karl der Grosse. Prelegos Parzival pri la projekto de kongreso de la gente duonigitaj urboj kaj pri ekologia aplilado de Esperanto.
- 17.6.19.00h Libera kunveno ĉe familio Weidmann.

ESPERANTOKLUBO WIL:

En restoracio Schweizerhof, Bahnhofstrasse 18.

- 4.5.20.00h Monata kunveno: Teresa el Pollando prelegos pri mem elektita temo.
- 1.6. Ekskurso kun pikniko en la regiono de Flawil. Ĉe malbela vetero ni prenos la programon de julio, kaj la ekskurso okazos je la 6-a de julio.

Mortis Jakob HOHL, Flims-Dorf

La 16an de februaro 1994 forpasis en Flims-Dorf/GR samideano Jakob HOHL. La 83-jarulo estis iama instruisto en privata duagrada lernejo.

Kiel esperantisto kaj SES-ano de 1936, membro de UEA kaj KELI, Hohl faris al la movado kelkajn konkretajn kontribuojn: en 1949 li gvidis Esperanto-kurson en Häbernbach/AG; en 1952 li verkis artikolon kun Esperanto-kurso en la porskolta gazeto 'Allzeit Bereit', kaj komence de la ekzisto de KCE li gvidis ĝian korektoservon por la Esperanto-kursoj. Depost 1979 Hohl perdis la kontakton kun la esperantistoj.

SES, KCE kaj KELI sentas la bezonon esprimi sian dankemon al Jakob Hohl, forte bedaŭras lian morton kaj sincere kondolencas al liaj familianoj.

(Anstataŭ donaci florojn, la funebra publiko estis petita sendi monon al KCE.) /aK/

HEMMANN (-KREBS) Dora

Alemanino naskita la 9an de septembro 1909 en Berno, mortinta la 3an de februaro 1994 samloke. Post la abiturientiĝo ŝi studis farmacion ĉe la berna universitato kaj laboris kiel apotekistino en Glarus, Leukerbad/VS kaj Berno. Dum multaj jaroj ŝi klerigis la farmaciajn asistentinojn. Apudprofesie ŝi aktivis en diversaj asocioj (Lyceum-Klubo, societo de akademianoj, profesiaj organizaĵoj). Hemmann estis vidvino kaj patrino de du infanoj.

Dum la gimnazia tempo, do meze de la 1920aj jaroj, Hemmann lernis E-on, pere de la gepatroj de lernejoj kolegoj, kiuj estis adeptoj de ĉi tiu lingvo. Sed ŝia profesio malhelpis poste movade aktivigi. Kiam en 1964 ŝia filo Bernhard (1950-1970) vojaĝis al la IJK en Amsterdamo (Nederlando), ŝi akompanis lin kaj estis devigita refreŝigi siajn E-konojn. De tiam ĝis la morto ŝi estis fidela membrino de diversaj E-organizaĵoj, kiel la berna EG, SES, k.a. (aK)

SES varme rememoros la mortintinon kaj kore kondolencas al la familianoj de Dora Hemmann.

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA/KCE

21-23-a de majo 1994: Ĵuraso renkontiĝo por migremaj esperanto-familioj kaj naturamikoj kun Claude kaj Andrée Gacond-Giroud (Svislando), neŭŝatelaj ĵurasanoj kaj natur-ŝatantoj.

Dum tiu-ĉi longigita pentekosta semajnfino renkontiĝos familioj kaj naturamikoj, kiuj konas Esperanton aŭ estas esperantistoj. Depende de la vetero, oni promenas al karakterizaj pejzaĝoj de la neŭŝatela ĵuraso, atentante naturajn fenomenojn kaj belaĵojn (geografiajn, geologiajn kaj botanikajn) kaj piknikos en la naturo aŭ en gastejo. Ĉion tion vi povos ĝui sub faka gvidado.

Sabate. Komenco 15.00 kun ekskurso; vespere: rakledo (tradicia svisa fromaĝmanĝaĵo) kaj lumbild-prelego de Claude Gacond en KCE. Dimanĉe: Post la matenmanĝo oni forveturos al dua ekskurso, survoje piknikos en la naturo aŭ en gastejo, kaj vespere manĝos fonduon ĉe KCE kaj ĝuos distran vesperon.

Lunde. Vizito de fromaĝproduktejo kaj fino de la programo je tagmezo-

25-a - 26-a de junio 1994 Semajnfinoj

1. STUDA SEMAJNFINO POR PROGRESANTOJ

CIKLO pri la literaturo, lingvo kaj historio de Esperanto.

Parto II: 1906-1922: Homanarismo de L.L.Zamenhof, mondanismo de Hector Hodler (UEA) kaj sennaciismo de Lanti (SAT).

Kun Claude Gacond (Svislando), instruisto, fondinto kaj komitatano de KCE, prezidanto de Svisa Esperanto-Societo, arkivisto de CDELI.

Ĉi-tiu kurso celas la publikon, kiu ŝatus progresi en Esperanto, aŭde, lege kaj parole. Oni legos tekstojn el la esperanta literaturo, faros gramatikajn kaj strukturŝanĝajn ekzercojn, konversacios kaj dum prelego ekscios ion interesan pri la historio de Esperanto. La instruisto adaptiĝos al la lingva nivelo de la kursanoj kaj pretos respondi al iliaj demandoj.

Claude Gacond estas multjare sperta instruisto de Esperanto. Liaj profundaj konoj de la esperantaj literaturo, lingvo kaj historio ĉiam estas neforgesebla sperto por ĉiu partoprenanto de liaj kursoj.

Sabate: Vespere oni kune manĝos rakledon aŭ fonduon en Kultura Centro Esperantista.

Dimanĉe: Tagmeze oni komune lunĉos ĉe KCE aŭ en urba restoracio.

2. MANĜI LAŬTEORIE KAJ PRAKTIKE

kun Ueli HAENNI; KURACISTO EL Svislando.

La kurso, bonveniganta ĉiujn fakulojn kaj nefakulojn, kiu interesiĝas pri la temo, tuŝos interalie fiziologiajn aspektojn de nutrado kaj la diferencon de nutrado en riĉaj kaj malriĉaj landoj. La preleganto ne parolos pri "kion manĝi?", sed pri "kiel manĝi?" kaj diskutos kun la partoprenantoj sugestojn kaj konsilojn, kiujn ili kelkfoje mem jes, foje tamen ne sekvas.

Lumbildoj pri kamerunio

Sabate vespere oni komune manĝos rakledon aŭ fonduon en KCE kaj poste ricevos perlumbilde koncizan enrigardon en la landon Kamerunio, kiun Ueli Haenni vizitis en 1988. Dimanĉe tagmeze oni komune lunĉos en KCE aŭ en urba restoracio.

R A D I O F M R /legita en La MIGRANTO)

estas asocia, nekomerca radio-stacio, kiu disaŭdigas, sur la frekvenco 89.1 MHZ, ĉiu-vendrede unuhoran programon en Esperanto en Tuluzo kaj ĉirkaŭaĵo.

"Konektu vin esperante" konsistas el: informoj, recenzoj kaj komentoj de kaj pri la esperanto-gazetaro, intervjuoj kun Esperantistoj kaj diversspeca esperanta muziko.

Pliajn informojn petu ĉe: RADIO FMR, Esperanto-Redakcio, 9bis, avenue Frédéric Estèbe, F-31200 TOULOUSE.

oo0oo

F A M I L I A F E L I Ĉ O

Al la familio Luisa kaj Augusto Ochova, Waldmannstrasse 53/D3 3027 Bern, (membro de la Esperanto-Societo Bern) naskiĝis je la 19-a de februaro 1994 la fileto

G A B R I E L

Al la feliĉaj gepatroj tutkoran gratulon. La eta Gabrielo estu la steleto de feliĉo en via familio. -Red "SI"-

oo0oo

INTERESULOJ NE FORGESU LA IFEF-KONGRESON;

kiu okazos de la 13-a ĝis la 20-a de majo 1994 en KREMS/Aŭstrio.

Detalojn volonte donos Gertrud Eggenberger Wurmbühlstrasse 10, CH-8405 Winterthur.

oo0oo

F A M E - K U L T U R P R E M I O al
BRUNO VOGELMANN kaj RICHARD SCHULZ

Ekstrakto el ricevita teksto de FAME-Fondaĵo:

FAME-fondaĵo kaj la germana urbo AALEN dediĉis la trian Esperanto-kulturpremion po duone al sinjoroj profesoro Richard Schulz, Minden kaj Bruno Vogelmann, Crailsheim. Dum Esperanto-Matinee en la sudgermana urbo Aalen la du premioj ricevis la plej altan Esperanto-kulturpremion, valora je 10'000 germanaj markoj, el la manoj de la ĉefurbestro Ulrich Pfeifle kaj de la prezidanto de FAME-fondaĵo, Alois Meiners el Stuttgart. Tiel estas agnoskata la alta kultura valoro, kiun kreis Bruno Vogelmann kaj Richard Schulz per siaj verkaroj. Bazo de la kunlaboro estas kontrakto inter la fondaĵo kaj la kulture aktiva urbo Aalen, kiu estas ankaŭ la sidejo de la grava Germana Esperanto-Biblioteko kun pli ol 10'000 titoloj el internacia kulturo kaj scienco.

Antaŭe Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds kaj la japana savisto de la Zamenhofa heredaĵo Ludoviko, (s-ro Kanzi Ito) estis ricevintaj la kulturpremion.

Bruno Vogelmann: Elstaras la naŭlingva komerca vortaro kaj la filozofia verko la "Nova Realismo".

Richard Schulz: Por la furorlibro "Mia amata Esperanto" li multe atentigis pri Esperanto vivanta kaj gajnis multajn simpatiojn por la ideo de mondvasta dua lingvo.

La loka gazetaro en Aalen estas tre favora al Esperanto kaj fiere fanfaronas, ke Aalen estu ĉefurbo de Esperanto! Malgraŭ tia troigo estas fakto, ke la urbo Aalen estas la partnero de la Germana Esperanto-Asocio kiel sidejo de la Germana Esperanto-Biblioteko; Aalen estas partnero de FAME-fondaĵo, koncerne la kulturpremion; Aalen jam kvarfoje eldonis belan, koloran urboprospekton; ĝi estis kunvenejo ĉarma de gravaj Esperanto-renkontiĝoj - kaj ĝi revas allogi UNIVERSALAN KONGRESON!

-FL-

MEJK invitas vin al




2a Mez-Eŭropa Junulara Semajno
kaj


2a Alemana Renkontiĝo

15.08.1994 - 21.08.1994

en Triberg (Sudokcidenta Germanio)



Adreso de la junulargastejo
Jugendherberge Triberg
Rohrbacherstrasse 35
D-78098 Triberg
Tel.: +49/7722/4110



TEMO

KORPO kaj ANIMO

kaj

SINPREZENTO de la Mez-Eŭropaj Landoj

AZB
8053 Zürich

PP/Journal
8053 Zürich

IMPRESSUM

Mitglieder-Information Schweiz. Esperanto-Gesellschaft
Aufgeber: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich
Herstellungsort: Copy Quick Zürich. 6x im Jahr
Red. Telefon 01/381 77 13

INTERESA FERIO-PROPONO DE HUNGARINO EDZINI-
ĜONTA KUN RUSO

"Ĉi-tiun someron en aŭgusto ni organizos vojaĝon de Budapeŝto al la altaj montoj en meza Azio, proksimume al la mongolia landlimo. Ni vojaĝos tien per aŭtomobilo kaj reen per trajno. La distanco de unu vojaĝo estas 4000 km kaj ĝi daŭros entute 25 tagojn. Ni vizitos la plej interesajn urbojn kaj elektos la plej idealan kaj malkaran vojon.

La kosto de la vojaĝo estas 940.- US/\$. Ni travojaĝos Ruslandon kaj alveninte ĉe la montoj "ALTAI" ni vivos 10 tagojn en la netuŝita tajgo, apud rivero kaj lago. Restado en la montoj en la tendo.

Kunporti: dormosakon, trinkujon, manĝilaron kaj teleron.

Eblas kunveni infanojn. La grupo estas limigita al 7 partoprenantoj.

Interesuloj kontaktu:

Georgina Zenlai, Kazal u.83, H-1031 Buda-pest".

Limdato por kontribuajoj al SES INFORMAS 4/94
estas la 6-a de junio 1994.